monias nek per politika premo, nek per milita perforto. Ĝia superregado estas simpla kaj nura traduko de ĝia senkompara ekonomia potenco, de ĝia supera riĉeco je produktiva kaj mona kapitalo. Usono ne ekspluatas la aliajn membrojn de la mondekonomio; male ĝi donacas por helpi al ilia rekonstruo (M a r s h a l l helpo kaj punkto 4 de la T r u m a n-programo). Tiaj ne estas la rilatoj interne de la totalitarisma bloko, kie la centra, superreganta ŝtato prenas multe pli ol ĝi donas, ĉar ĝi troviĝas — industrie, teknike, organizmetode, laborkvalite kaj laboristkvalifike — *sur ŝtupo malpli alta* ol la plimulto de la satelitaj ŝtatoj okcidentaj (speciale Ĉeĥoslovakujo kaj Orientgermanujo).

Vertikalstrukture la renaskiĝanta mondekonomio similas tiun de la antaŭa fazo; tamen la senlaboreco konsiderinde malkreskis, kaj la plej malsupra tavolo de la daŭraj, dumvivaj senlaboruloj tute malaperis. La bezonoj de rekonstruo kaj de renovigo post tiel longaj kaj teruraj militaj jaroj kreis altan konjunkturon en ĉiuj branĉoj. En sufiĉe vasta sektoro de kelkaj okcidenteŭropaj landoj (speciale Britujo kaj Francujo) okazis pli grava strukturŝanĝo sekve de naciigo (aŭ sociigo aŭ ŝtatigo). La pure ekonomiaj rezultoj ĝis nun atingitaj ankoraŭ ne estas konvinkaj; sed la *socia* konsekvenco estas, ke granda parto de la salajrularo tiea malproletiĝis, ĉar por la okupatoj de la naciigitaj branĉoj, ne plu ekzistas la antagonismo „proletaro-kapitalistaro", kiu estis la ĉefa socia kontraŭstaro de la lastaj cent jaroj.

Sekve de kreo de multaj leĝoj kaj institucioj reguligaj, kunordigaj kaj planadaj, la Usona ekonomio ŝajnas hodiaŭ pli bone armita kaj ŝirmita kontraŭ krizoj ol antaŭe. Ĝia relativa stabileco havos certigan influon sur la aliajn naciekonomiojn, kies ritmo pli kaj pli adaptiĝas al tiu de Usono, ĉefa kaj centra kerno.

El tiu stato rezultas por la estroj de Usona ekonomio grava gvidrespondeco. Tiun respondecon ili ne serĉadis, nek alcelis. La objektivaj cirkonstancoj trudis tiun embarasan honoron al la granda transatlanta Respubliko. Pli kaj pli, laŭ la saĝa instigo de Usono, la aliaj landoj liberaj reproksimiĝas unuj al aliaj, klopodas harmoniigi siajn respektivajn ekonomiojn kaj ilin enirigi en la renaskiĝantan mondekonomion.

Tiun problemon povos solvi nur libervola interkonsento de liberaj, konsciaj kaj demokratece regataj nacioj pri kreado de federacio de samrajtaj ŝtatoj. Se la nacioj ne komprenus la *historian neceson de tiu federacia solvo*, tiu historia neceso efektiviĝus per trudo, perforto kaj teroro, kaj ĝia instrumento — Attila [1]) — ja ie kaŝatendas ......

[1]) Estro de mezazia popolo, kiu penetris en Eŭropon. (Red.)



## DEMOKRATA EDUKADO

de Rektoro KARL SÖDERBERG.

Prelego en Internacia Somera Universitato, Bournemouth 1949.

Antaŭ kelka tempo mi trovis en faka revuo grandan artikolon kun la pretendema rubriko *La plej grava problemo*. Ĉar ni modernaj homoj ja ofte kaj senkritike uzas troajn esprimojn, mi sufiĉe indiferente tralegis la unuajn liniojn. Anticipe mi ja tute ne povis scii, ĉu temas pri la enkonduko de Esperanto en la praktikon, pri la aktuala internacia situacio aŭ simple pri la lasta longeco de virina jupo. Post nur kelksekunda studado mi tamen trovis, ke la verkinto pritraktas la demandon, kiamaniere ni sukcesos eduki la gejunularon por demokrata vivado kaj paca kunlaboro. Ĉu vi ne konsentas, ke tio vere estas la plej grava problemo de la homaro hodiaŭ?

Dum la lasta jardeko ni per plej terura rekta instrumetodo eklernis, ke la homaro ne por ĉiam sekure kaj memkompreneble posedas tiun civilizon, kiu estas kreita per la laboro kaj klopodo de jarcentoj. Ni spertis, kion la t.n. kulturhomo kapablas fari, se li ne plu gardas kaj respektas la elementajn valorojn, kiuj devas reguligi la interhoman kunvivon. La homo havas en si terurajn eblecojn. La pratempa besto en la homo ĉiam embuske atendas sian okazon. La barbareco — diris fama filozofo — ŝajnas esti la natura stato de la homaro, dum la civilizo estas kiel eta maldensaĵo en la ĝangalo. Ne plu estas la danĝeroj de la ekstera naturo, kiuj minacas nin — ilin ni sukcesas superregi tre efike. Sed la sovaĝulon en ni mem ni ne povis bridi same sukcese. La plej grava problemo hodiaŭ do estas trovi rimedon, per kiu ni povos deturni novan ofensivon de la brutalon en la homa naturo. Post la teruraĵoj de la dua mondmilito ni rajtas postuli, ke tiu brutalo neniam plu venku la pli noblajn instinktojn de la homo, ke la perforto neniam plu triumfu super la justeco sed anstataŭe, ke bona volo kaj toleremo regu inter la homoj. Se ni iam liberiĝos el tiu marĉo de suspektemo kaj malamo, de krueleco kaj barbareco, en kiu la homaro denove preskaŭ dronis antaŭ precize dek jaroj, estas necese ke ni lernu kompreni unu la alian, ke ni lernu kompreni ke tio, kio kunligas nin homojn estas multe pli grava kaj pli esenca ol tio, kio diferencigas nin.

La Atlantika Deklaracio sendube atakis tre gravan flankon de la problemo per siaj postuloj pri „liberiĝo el mizero kaj liberiĝo el timo". Socia mizero kaj nesekureco grandaparte estis la grundo, el kiu elkreskis la kaŭzoj de la dua mondmilito. La faŝismo estis produkto de la senlaboreco kaj la socia maltrankvilo en la intermilita Italujo. La nacisocialismo estis negrava sekto tiel longe kiel la vivkondiĉoj estis tolereblaj, kaj ĝi fariĝis amasmovado nur dum la ekonomia depresio, kiu kreis ses aŭ sep milionojn da senlaboruloj nur en Germanujo. Se la mondo estus oferinta nur malgrandan eron de la miliardoj, kiujn kostis la milito, por forigi la kaŭzojn de mizero kaj timo, la dua

mondmilito eble neniam estus eksplodinta. Vera paco kaj sana demokratio necese devas esti fonditaj sur socia justeco kaj sur pli homogena kaj justa disdivido de la materiaj rimedoj.

Sed, samideanoj, mi volas demandi, ĉu ne la timo kaj angoro, kiuj premas la modernan homon, ankaŭ havas alian kaŭzon ol nur la materian nesekurecon. Ĉu dum la nervoza rapidego kaj senripozemo de hodiaŭ ni ne perdis certajn esencajn valorojn? Ĉu ni verdire ne suferas pro manko de vere *homa* kuneco? Povas ŝajni strange en la epoko de amasmovadoj kaj grandurboj, de organizoj kaj mondkongresoj, ke la homaj interrilatoj ne estas kontentigaj, sed mi verdire opinias, ke tio estas fakto. Mi provos motivigi mian opinion per ekzemplo.

Ni modernaj homoj ofte fieras pri la giganta evoluo de la scienco kaj la tekniko. Dank' al pli kaj pli rapidaj komunikiloj la geografiaj distancoj konsiderinde mallongiĝis. Ne plu estas utopio, inda je aventura verkisto kiel Jules Verne, veturi ĉirkaŭ la tero en 80 tagoj — oni jam faris tion en malpli ol 8 tagoj. Kolumbo siatempe bezonis dek semajnojn por transiri la Atlantikon. Nun estas reala ebleco matenmanĝi en Ameriko, lunĉi en Eŭropo kaj reveni al Usono ĝustatempe por malfrua tagmanĝo. Sed, mi volas demandi, kiel utilas al ni, ke ni povas veturi kelkcent kilometrojn en horo kaj atingi fremdajn landojn en rekorda tempo, se ni ne povas komprenigi nin, kiam ni estas tie? Per la radio ni povas aŭdi voĉon de la kontraŭa flanko de la terglobo pli klare ol voĉon, kiu krias al ni de la alia flanko de la strato. Sed kiel utilas al ni, ke nia voĉo povas atingi milionojn da homoj ĉirkaŭ la mondo, se ni ne eluzas tiun eblecon por disvastigi bonajn, saĝajn kaj humanajn opiniojn, sed anstataŭe elblekas frazojn de malamo kaj malvero? Ni disponas pli grandan kvanton da energio ol iu antaŭa generacio kaj ni majstras preskaŭ ĉiujn miraklojn de la tekniko. Sed kiel utilas al ni, ke ni povas liberigi la kaŝitan energion de la atomoj kaj per tio ekhavi grandegajn potencojn kaj rimedojn, se ni ne uzas ilin por la bono de la homaro, sed kontraŭe por fari la mondon neloĝebla por la homoj?

Tro ofte kaj tro facile ni forgesas, ke la produktoj de la tekniko estas nur iloj, helprimedoj, kaj ke ilia vera utilo grandaparte dependas de la spirito, en kiu ni uzas ilin. Sur bela medalo, kiu foje estis stampita honore al la granda sveda popolgvidanto Hjalmar Branting, staras la latina sentenco *Mens agitat molem* (la spirito ekmovas la materion). Je supraĵa rigardo povas ŝajni, ke la materio ĝenerale estas pli forta ol la spirito kaj per sia potenco regas la evoluon. Sed efektive la tekniko mem same kiel la scienco ja estas kreitaĵoj de la menso, de la spirito. Se ni volas savi la mondon kaj nin mem de pereo kaj ruiniĝo, estas necese, ke ni rekonu la superecon de la spirito. Tio kion ni hodiaŭ bezonas pli urĝe ol ion alian ne estas pli da tekniko, nek pli da organizo, nek pli da efikeco sed pli da *humaneco*. La fama svisa edukisto P e s t a l o z z i iam skribis, ke ni devas celi ne al *la socialigo de la homo, sed al humanigo de la socio.* La unua kondiĉo por pli granda humaneco estas pli grandaj toleremo kaj kompreno inter la nacioj kaj inter la individuoj. Malgraŭ tio, ke la terglobo kvazaŭ kuntiriĝis sub la inkuba premado de la tekniko, ni ne povas konkludi, ke la homoj kaj popoloj alproksimiĝis unu al la alia. Unu el la plej gravaj kaŭzoj ja estas la neegaleco rilate al lingvoj, sed ni devas fari nian eblon por eltrovi ankaŭ la ceterajn kaŭzojn.



Unu el la plej eminentaj kaj influaj pedagogoj de nia tempo, la amerikano John D e w e y, en sia libro pri *Demokratio kaj edukado,* interalie diras, ke la naturscienco kaj la tekniko progresis pli multe ol nia scio pri la homoj, kaj nia kapablo regi la homojn. Por egaligi la ekvilibron ne estas necese ĉesigi la evoluadon de la naturscienco favore al la humanismaj studoj, kion proponis kelkaj modernaj sociologoj, sed estas dezirinde doni humanisman celdirekton al la — el socia vidpunkto necesa — naturscienca kaj teknika edukado. Tiu edukado ne povas plenumi sian taskon en moderna demokratio, se ĝi estas izolita for de siaj humanaj fontoj de inspiro. Ĉiu studado, kiu perdas sian esencan interligon kun la bezonoj de la nuntempaj vivado kaj agado de la homoj, facile evoluas al nura specialaĵo, kaj tiamaniere malpliiĝas ĝia valoro por la demokrata socio. La sprita angla verkisto G. K. C h e s t e r t o n foje akcentis la riskon de troa specialiĝo kaj diris, ke la homaro nuntempe konsistas el du kategorioj: tre eta malplimulto kiu scias ĉiam pli multe pri ĉiam malpli multe (temas pri la fakuloj, la spertuloj) kaj imponege granda plimulto kiu scias ĉiam malpli multe pri ĉiam pli multe (estas ni ordinaraj mortemuloj, vi kaj mi, kiuj ĉiutage per la radio, la gazetaro kaj filmoj ekhavas supraĵan konon pri multaj temoj, sed eble ne majstras eĉ unu el ili). Chesterton ja estis lingva virtuozo, kiu ŝatis la vortludadon kaj eble ankaŭ certan troigon, sed principe li pravis. Tia specialiĝo certe estas neevitebla en la fakinstruado, sed en aliaj regionoj de la socio ĝi devas esti kompletigita per pli ĝenerala klero. En demokrata socio, kie ĉiu plenkreskulo partoprenas kaj en influo kaj en respondeco, ne sufiĉas havi bonan konon pri tiu profesio, el kiu oni gajnas siajn vivrimedojn. Malnova proverbo diras, ke *tiu ne konas Anglujon, kiu konas nur Anglujon,* kaj tiu tezo certe estas aplikebla al la plej multaj kampoj de la homa ekzistado. Ĉioscio ne estas ebla en nia tempo, sed nur sufiĉe multampleksa kono pri la vivkondiĉoj de moderna demokratio ebligas kaj garantias grandvalorajn kontribuojn al la socia kaj kultura evoluado.

Pritraktante la demokration oni devas ne malatenti, ke tiu nocio ne havas klare fiksitan signifon. Ne malofte la vorto estas uzata pri socio, en kiu oni sukcesis atingi certagradan ekonomian kaj socialan egalecon. Demokratio do signifus idealan staton, kies realigon oni deziras ĝisvivi. Aliaj homoj rigardas la demokration ne kiel sistemon aŭ doktrinon, sed kiel koncepton, kiu malgraŭ konstantaj malvenkoj evoluis en la okcidenta Eŭropo en la daŭro de pli ol du jarmiloj. Alivorte demokratio estas speco de temperamento en la rilatoj

inter la homoj, kiu fondiĝas sur la ideoj pri libereco, justeco kaj respekto por la digno de ĉiu unuopa homo. Fine multaj politikaj sciencistoj donas al la vorto demokratio alian kaj pli limigitan sencon. Demokratio ne estas iuspeca speciala civilizo, diras la anglo R. B a s s e t t, sed ĝi simple estas civilizita maniero fari politikajn decidojn laŭ certa metodo, nome tiu de la principo pri plimulto.

En la okcidenta Eŭropo tiu metodo jam de longe estas akceptita kaj praktikata, ĉar regado de plimulto pli bone ol iu alia ĝis nun konata reĝimo garantias al la civitanoj maksimumon de politika libereco, politika influo kaj politika respondeco. Por gardi la interesojn de la malplimulto la plimulta principo devas esti kombinita kun libera debato kaj bona volo por kompromiso. La kompromiso en si mem ne estas malestiminda, ĉar ĝi postulas respekton por la opinioj de aliaj homoj kaj konvinkon pri tio, ke pacemo kaj kompreno estas pli esencaj ol batalo kaj devigo.

La politikaj metodoj kaj formoj de la demokratio devas esti bazitaj sur la ĉefprincipo, kiun Abraham L i n c o l n siatempe esprimis per la vortoj, ke neniu unuopa homo aŭ grupo da homoj estas sufiĉe saĝa kaj sufiĉe bona por regi aliajn homojn sen ilia libera konsento. La pozitiva signifo de tio estas, ke ĉiu, kiun koncernas la sociaj institucioj, ankaŭ devas havi eblecon partopreni en la agado por krei kaj gvidi ilin. La kerno de la demokratio kiel vivprincipo do estas la deziro, ja eĉ la postulo, ke ĉiu plenkreskulo kontribuu al la kreado de tiuj valoroj, kiuj estas plej esencaj por la interhoma kunvivado.

Laŭ nuntempa koncepto la demokratio ne estas firme enradikiĝinta en denaska libereca instinkto de la homoj, sed anstataŭe ĝi ĉefe devas esti rigardata kiel produkto de la edukado. Sekve la sola sekura garantio por la daŭra ekzisto kaj evoluo de la demokratio estas intencaj kaj saĝaj aranĝoj en la kampo de la edukado. Inter demokratio kaj edukado regas profunda reciproka dependeco, kion klarigas jam la fakto, ke la demokratio en si mem estas edukada principo. La edukado havas fundamentan gravecon por la formado de tiuj kutimoj kaj opinioj, kiuj igas la homojn penadi al paco, demokratio kaj ekonomia sekureco. En larĝa senco ĉiuj sociaj institucioj ja estas edukejoj, sed la hejmo kaj la lernejo estas la senkompare plej gravaj el tiuj faktoroj, kiuj povas influi la celojn kaj valorojn de la demokratio. Ĉie kie demokratio malsukcesis kaj pereis, ĝi ne estis sufiĉe profunde ankrita en la ĉiutaga vivo. Ne sufiĉas ke la demokratio funkcias dum la porelektaj kampanjoj kaj en la parlamento. Ĝi devas havi memkompreneblan lokon en la ordinara agado en la hejmoj, lernejoj kaj laborejoj kaj ankaŭ en la libertempa okupado.

Unu el la plej fervoraj iniciatantoj kaj defendantoj de demokrata edukado, Horace M a n n, foje deklaris, ke li certe kredas je la ebleco de memregado, kiun posedas la homoj, sed ke li samtempe scias, ke temas nur pri ebleco kaj



ne pri denaska kapablo. Sekve ĝenerala popola edukado estas la ununura rimedo per kiu la ebleco povos fariĝi realaĵo. Kaj li aldonis: *En la edukado troviĝas nia sola politika sekureco. Ekster tiu arkeo regas la diluvo. La ĝenerala lerneja eduko estas la plej granda elpensaĵo, kiun la homo iam faris. Ĉiuj aliaj sociaj institucioj estas nur kuraciloj por malbonaĵoj. Sed la lerneja eduko deturnas ilin kaj funkcias kiel preventilo.*

Se oni atribuas al la edukado tiom da graveco kiel faras Horace Mann — kaj mi tiurilate samopinias kun li — oni ankaŭ estas devigata montri, per kiuj agoj kaj metodoj la hejmoj kaj la lernejoj povas kunhelpi al la formado de vere demokrataj civitanoj.

La influo de la hejma medio kompreneble multe varias depende de diversaj faktoroj, ekzemple, ĉu la socio principe nur provizas la infanojn je senkosta instruado dum kelkaj jaroj kaj cetere transdonas al la gepatroj la respondecon kaj la kostojn por la edukado, aŭ ĉu la socio per multspecaj helparanĝoj provas doni al ĉiu knabo kaj knabino la saman ŝancon ricevi la plej bonan ĝeneralan kaj fakan instruadon. Sed ĉiam kaj ĉie la eduka influo de la hejmoj estas tre grava. Tiu spirito, demokrata aŭ nedemokrata, kiu regas en la hejmoj, ordinare estas senkritike akceptata kaj asimilata de la infano. La hejmoj do havas esencan parton en la lernigado de tiuj ideoj, pensoj kaj konceptoj, kiuj kune konsistigas la homan kulturan heredaĵon. Jam en la antaŭlernejaj jaroj la infanoj proprigas al si multajn, eble tutvivajn ideojn kaj kutimojn, kaj ankaŭ post la komenco de la vizitado al lernejo la karaktero kaj la kvalito de la hejmo estas same grava. La lernejo disponas nur relative malgrandan parton de la tempo de la infanoj — maksimume 20 % dum la semestroj kaj 15 % dum la tuta jaro — kaj eĉ pli atentinde estas, ke la intimaj kontaktoj en la familio pli facile atingas la kernon de la personeco ol la pli formalaj kontaktoj en la lernejo. Do oni prave povas diri, ke la elementa kaj plej necesa edukada tasko estas, eduki bonajn gepatrojn!

Eble mi devas memorigi pri tio, ke la influo de la hejmoj rilate al la edukado de la infanoj etendiĝas en la lernejon ankaŭ tiamaniere, ke ekzistas specialaj gepatraj societoj aŭ similaj organizoj por kunlaboro inter hejmoj kaj lernejoj, kaj aliflanke la lernejaj aŭtoritatoj per ili ja havas grandvaloran helprimedon por influi la opiniojn de la gepatroj. Resume mi povus diri, ke la hejmo havas la plej fortan senperan influon sur la infanoj, sed la lernejo gvidas la evoluon kun longa perspektivo kaj peras novajn opiniojn kaj pensmanierojn.

Pri la eblecoj kaj metodoj, kiujn la lernejo havas por inokuli en la lernantojn demokratajn pens- kaj viv-manieron, mi povas fari nur kelkajn mallongajn rimarkojn. Kiam la infano komencas partopreni en ordinara instruiĝo — en la aĝo de 6 ĝis 7 jaroj — ĝi eklernas adaptiĝi al aliaj infanoj, kaj komuna ludado en grupetoj aperas. Estas konsilinde ebligi al ili simplan kunlaboron en tiaj malgrandaj grupoj, sed estas tro frue konfidi al la infanoj

iun respondecon por la tuta klaso. La sola kolektivo, kun kiu la infano sentas solidarecon, estas la familio. Sed post du-tri jaroj oni povas rimarki certan liberiĝon for de la gepatroj kaj novajn rilatojn al la kamaradoj. La antaŭa aŭtoritata moralo cedas al moralo de reciprokeco. La sociala evoluado devas adaptiĝi al tiu ŝanĝo. La instruado pri la hejma regiono nun estas dividata en tri fakojn, nome, historion, geografion kaj naturscion. Per ili estas eble stimuli la socialan tendencon de la infanoj; en la historio per la ekzemploj de socie agantaj kaj kreantaj pioniroj, en la geografio per aktualigo de samtempaj sociaj problemoj, en la naturscio per atentigo pri la neceso de kunlaboro kiel vivkondiĉo en la mondo de la naturo k.t.p.

En la aĝo de 10 ĝis 12 jaroj la intereso por sociaj demandoj ordinare konsiderinde vigliĝas, kaj estas grave evoluigi la novajn impulsojn en kiel eble plej multaj situacioj. Nur teoria instruado pri socia vivado ne sufiĉas; ĝin devas kompletigi diversaj aranĝoj por lasi respondecon kaj decidon al la lernantoj mem. Multloke oni provis realigi tiun programon pri enkonduko de demokratio en la lernejon per certagrada memregado de la disĉiploj. Konsilantaro konsistanta el lernantoj ordinare igas la junulojn konsciaj pri iliaj propraj problemoj kaj pri la neceso ataki ilin serioze kaj malegoisme. Kiam lernanto spertas, ke liaj vortoj kaj agoj havas konsekvencojn ne nur por li mem sed ankaŭ por liaj kamaradoj, en lia interno vekiĝas socia konscio, kaj ĝin nia hodiaŭa mondo tre urĝe bezonas. Junulo, kiu mem estis membro de tiaj konsilantaroj, diris: *Post la lerneja tempo estas necese fari decidojn, ofte decidojn kiuj koncernas nian tutan vivon. Tio, kion la lernantoj lernis pri algebro, la gepatra lingvo kaj aliaj temoj, ne helpas ilin fari saĝajn decidojn. Estas tio, kion ili lernis pri la socio mem, kio havos por ili la plej grandan utilon. Ili pli facile povos elekti siajn vidpunktojn kaj poziciojn, se ili lernis pensi kaj agi memstare kaj kunlabori kun aliaj por la komuna bono.*

La aktiveco akcentiĝas en la aĝo de 10 ĝis 12 jaroj kaj atingas sian kulminon en la t.n. heroa aĝo. Je tiu impresiĝema aĝo aŭtoritateca kaj diktatoreca instruado povas kaŭzis grandan difekton. Same grave estas, ke la gejunuloj dum la puberiĝaj jaroj ricevas prudentan gvidadon kaj moderan memregadon. Neniam estas pli grave ol je tiu aĝo atenti, ke la celo de la lernejo ne estas krei amas-homojn sen individueco, sed vere demokratajn individuojn. Sed la ĉefa premiso por la demokrata edukado estas, ke la lernantoj vivas kaj kondutas demokrate en la lernejo. Demokrata vivkoncepto kaj demokrata kompetenteco ne estas rezultoj de fiktivaj situacioj, sed de aktiva partoprenado en la ĉiutaga laboro de lernejo, kie la administrado, la instruado kaj la tuta organizo funkcias laŭ demokrataj principoj. Nur se la lernejo ĉiurilate respektas tiujn principojn, ĝi povas krei en siaj disĉiploj respekton kaj sindonemon por la demokratio.

Fine mi dezirus atentigi pri speciala problemo — aŭ pli ĝuste komplekso de problemoj — kiu devas esti konstanta elemento de la demokrata edukado.



Mi aludas la internacian pensmanieron, kiu ankoraŭ ne trafermentigis la homaron. Estas tre dezirinde, aranĝi interŝanĝon, trans la landlimojn, de instruistoj kaj lernantoj, fondi internaciajn edukejojn, instrui pri la Unuiĝintaj Nacioj, prilabori jam ekzistantajn kaj verki novajn lernolibrojn en internacia spirito k.t.p. Ni ankoraŭ ne forgesis, kien kondukas primitiva nacia egoismo, kiam ĝi estas aplikata en la rilatoj inter la nacioj. Mi tute konscie diras *primitiva* ĉar ĝuste ĉe la t.n. primitivaj popoloj oni plej pure kaj konsekvence renkontas la kredon pri la supereco de la propra gento aŭ raso. Kiam ekzemple la unuaj eŭropanoj atingis Okcident-Hindujon kaj demandis la soveĝajn karaibojn, al kiu tribo ili apartenas, ili respondis: *Ni estas la solaj homoj.* En la sama maniero la aziaj tunguzoj kaj skandinavaj laponoj nomas sin tute simple *la homoj* en siaj respektivaj lingvoj. Kaj la eskimoj laŭdire kredas, ke la eŭropanoj vizitas ilin por lerni kulturon kaj bonajn morojn. La plej alta laŭdo, kiun eskimo povas doni al alia homo, estas ke tiu estas aŭ baldaŭ estos *vera eskimo.* Kiel ni scias, ne estus malfacile trovi ekzemplon pri simila superstiĉo en pli malfrua tempo kaj en pli mallonga geografia distanco.

Ni Esperantistoj havas speciale fortan kialon kontraŭagi tiajn esprimojn de nacia memsufiĉeco, sed ni ne havas iun ekskluzivan rajton pri tiu agado. Estas la nerefutebla rajto — kaj devo — de ĉiu homo labori por tutmonda interkompreno, kaj la plej efika metodo sendube estas — demokrata edukado.

## PRINCIPOJ PRI LINGVON GVIDADO

408.92

far D-ro Inĝ. G. HAMMING

Sendube redaktantoj povas influi la evoluon de la lingvo. Tial ŝajnas al mi ĝuste, doni miajn ideojn pri tiu temo. Tio faciligas la diskutojn pri lingvon uzo.

Esp-o fontas el la lasta parto de la 19a jarcento. Tiam estis granda distanco inter scienculoj kaj laikoj. La scienco ĵus trovis multajn novajn konceptojn; ilin la laika publiko ankoraŭ ne akceptis. La scienculoj kredis ke ilia scienca laboro estas preskaŭ preta. Ankoraŭ la precizan valoron de kelkaj konstantoj oni volis mezuri, kelkajn detalojn oni sciis esplorendaj, — sed la ĉefa tasko estis liberigi la laikojn el la ĉenoj de la tradiciaj sensencaĵoj. Mispensigaj kaj konfuzaj estis vortoj kiaj: sorĉi, koboldo, diablo, infero, anĝelo, ombrulo (postmorta aperanto), kaj multaj aliaj.

La konceptoj fariĝadis klaraj kaj definitivaj. Jam sufiĉus se oni trovus definitivan klaran lingvon por teni tiujn konceptojn klarajn kaj malteni la tradician balaston.

El tiu ĝenerala ideo fontis du sintenoj: Se jam eblas supervidi la kompletan nociaron, estas necese konstrui la novan lingvon tre perfekta. Etaj